# A.E.A.-informilo

**Numero 10** **Julio 2012**


# Pliriĉiĝo de la AEA-biblioteko


De tempo al tempo nia **Astura Esperanta Asocio** ricevas, el la familioj de forpasintaj samideanoj, ĉi ties esperantan libraron. Antaŭ ne multe da tempo ni ricevis la legacojn de Julio Argüelles kaj José Palacio Tuero. Tiele, kaj pro aliaj donacoj kaj la aĉetaĵoj de la E-grupo mem, iom-post-iom nia biblioteko pligrandiĝas kaj pliriĉiĝas.

Sed lasttempe la pligrandiĝo de nia libraro estis subita kaj grandkvanta, kaj tio estis rezulto de unusola donaco, tiu kiun faris al ni la nepo de nia neforgesebla samideano Adonis González Meana. Ĉi sola alportaĵo preskaŭ duobligis la enhavon de nia biblioteko. Estis necese ke la **Universitata Katedro "Jovellanos"**, en kiu estas enkadrigita nia E-asocio, provizu al ni kromajn ŝrankojn por enteni tiel valoran kaj ampleksan libraron.

Ne nur libraro, sed ankaŭ kolektoj de revuoj, kaj ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en kaj pri aliaj lingvoj: franca, angla, rusa…, kaj pri tre diversa temaro. La intereso de nia klera samideano Adonis ampleksis multajn kultur-branĉojn, kaj tio respeguliĝas en lia (de nun, nia) biblioteko.

La suba foto en ĉi tiu paĝo montras kiel restas la granda libro-bretaro ene de nia malgranda ejo. Ni esperu ke, tiel la libraro kiel la ejo mem, havu grandan utilon por personoj dezirantaj lerni kaj praktiki la Internacian Lingvon. Dum la lerno-kurso nun finiĝanta ni ne sukcesis veki grandan intereson pri nia afero en la universitata medio kie troviĝas nun nia E-sidejo. Eble en estontaj lerno-jaroj nia penado tiurilate estos pli profitdona. Al tiucela laboro ni alvokas ankaŭ la tutan membraron de la Asocio. Esperanto, kiu nun fariĝas 125-jara meritas plian sukceson.






# Prelegoj pri Esperanto en la **IES** de Moreda

La 24an kaj 25an de majo okazis en la Gimnazio (mezgrada lernejo) de Moreda la t. n. ***9a Celebro de la Kulturaj Tagoj de Aller-Valo***. Ĉi-jare la titolo kaj temaro de la Celebro estis: ***Kulturo kaj Komunikado: La mil kaj unu lingvoj***. Kadre de tiu interesa aranĝo okazis diversaj konferencoj pri la temo de la idiomoj kaj aliaj esprim- kaj komunikad-rimedoj. Inter aliaj, ankaŭ nia Esperanta organizaĵo estis invitita parto-preni pere de prelegado. La prelegoj pri Esperanto estis du, ambaŭ la 25an de majo, je la 8a horo kaj duono kaj je la 9a horo kaj duono. Gvidis ambaŭ konferencojn Faustino Castaño, sekretario de nia **Astura Esperanta Asocio**. La publiko estis gelernantoj (15-jaraj) kaj geinstruistoj de tiu centro. Por la prezent-ado de la temo oni disponis je taŭgaj aŭdo-vidaj iloj: komputilo konektita al Interreto, kanon-projekci-ilo… La publiko bone povis vidi la instru-materialon je kiu ni disponas por tiutipaj aktoj kaj kelkajn partojn de nia ret-paĝo.
Tial ke nuntempe ne estas facile aliri al la publiko por veki intereson pri la lernado de Esperanto, la aktoj kiel tiuj prelegoj estas interesaj por diskonigi nian aferon. Kompreneble, ne ĉiuj ĉeestantoj montris specialan intereson pri la Internacia Lingvo sed iuj inter ili kaj ĉefe la geinstruistoj atentis pri la ebleco ke la Eŭropa Unio promociu komunan lingvon kiel Esperanton por la interkomunikado ene de la Unio kaj la interrilatoj kun la ekster-Uniaj landoj.




# Datreveno de la Unua Libro en Esperanto

Dum tiu ĉi monato, julio de 2012, Esperanto celebras sian 125-an datrevenon. Ĝi estas motivo por ĝoji, kaj tial mi deziras, nome de la tuta estraro de HEF, gratuli vin kiel esperantiston, kaj kundividi la sentojn de gajeco kaj fiereco pri tio kion nia movado atingis ĝis nun.
La tago kiun oni ĝenerale konsideras kiel naskiĝdaton de nia lingvo estas la 26-a de julio, kaj ni volas kuraĝigi la anojn kaj la lokajn kaj regionajn asociojn ĝue celebri la datrevenon. Ne nur nun, sed dum la tuta jaro, sed la naskiĝtago estas ankaŭ bona okazo por informi la mondon pri la vivanteco kaj la eblecoj de nia kara lingvo, kaj ni invitas vin profiti tiun momenton. HEF-estraro planas sendi komunikon al la gazetaro, kaj havas aliajn planojn por la periodo post la ferioj, kaj via kunlaboro estos tre aprezata.
Ĝenerale Hispana Esperanto-Federacio deziras intensigi la agadojn por Esperanto, profitante ĝuste tiun ĉi datrevenon. Ni volas ankaŭ kreskigi la varbadon ne nur al Esperanto, sed specife al nia asocio. Pri tio, ĉiu ideo estas bonvena, sed ni ĉefe atendas ĉies kunlaboradon. En asocio de volontuloj, kiel nia, estas tre malmulto kion la estraranoj povas fari solaj. Ne hezitu kontakti nin por aldoni vian kontribuon.
Ni denove gratulas vin, kaj esperante ke vi ĝuos ne nur tiun ĉi datrevenon, sed la tutan jubilean jaron, vin salutas nome de la estraro,
José Antonio del Barrio



## Vizito al la sidejo de HEF kaj MEL

La 18an de junio ĉi-jare, la sekretario de nia **Astura Esperanta Asocio** vizitis la madridan sidejon de **Hispana Esperanto-Federacio** kaj **Madrida Esperanto-Liceo**. Ambaŭ esperantistaj asocioj kunhavas saman ejon. Tie li kunvenis kun la HEF-Prezidanto kaj aliaj geestraranoj de tiuj institucioj kaj transdonis al ili ekzemplerojn de la laste eldonita numero 87-a de ***HELECO*** por la respektivaj bibliotekoj.
En la foto, de dekstre al maldekstre: José Antonio del Barrio, Prezidanto de **HEF**, Manolo Parra, Faustino Castaño kaj Carmen Suárez.

# Heleco 2012

Ĝenerale, en la pasintaj jaroj nia E-asocio publikigis ĉiujare unu numeron de sia presorgano, la revuo **Heleco**, sed ĉi tiu jaro, 2012, estos escepto. Ni jam publikigis unu numeron, la 87an, en monato majo, kaj planas eldoni la sekvan numeron antaŭ la fino de la jaro. Ambaŭ numeroj, kies frontpaĝojn ni montras sube en ĉi tiu paĝo, estas dediĉataj al sama temo: la hispana konstituciismo, tial ke 2012 estas la Dua Centjaro de la aprobo de la unua hispana konstitucio, tiu de 1812, proklamita la 19an de marto de tiu jaro.
Fakte, la raportado pri la historio de la konstituciismo en Hispanio estas priraporti la historion de la lando mem. La diversaj konstitucioj ekzistintaj en nia lando estis tre ligitaj al la ceteraj historiaj eventoj: politikaj, sociaj, ekonomiaj, religiaj…kaj eĉ la civilmilitoj. La unua el tiuj du volumoj priraportas la periodon 1812 al 1912, kaj la dua, kiu troviĝas en preparo, pritemas le periodon de 1812 al la nuntempo.
Oni invitas al ĉiuj, kiuj dezirus kunlabori en la priredaktado de tiu temo, sendu al ni siajn kontribuaĵojn por ties publikigo kun la materialo je kiu ni jam disponas.






# La Esperanta branĉo de

## Kio estas Vikipedio?

Vikipedio estas enciklopedio. Sed ne kiel ordinara papera enciklopedio, kiu staras en biblioteko sur la bretaro. Temas pri multlingva enciclopedio en Interreto kiun ĉiu povas facile ne nur konsulti sed ankaŭ kunredakti. Kunredakti ne nur per fakaj scioj, sed ankaŭ per forigo de tajperaroj ktp. Sed la vorto "Vikipedio" konkretas la esperantlingvan branĉon de la tuta biblioteko, kiu, por aliaj lingvoj povas uzi aliaj nom-formojn, la originala kaj plej kutima estas Wikipedia.

En ciu lingvo, ĝi entenas diversajn kapvortojn. Por ĉiu el ili estas iu interreta paĝo. Sur ĉiu paĝo estas alklakebla ligilo "Redaktu" per kiu iu ajn povas ekredakti aŭ pluredakti. Interesa aspekto estas la multlingveco: el ĉiu artikolo pri iu temo en iu ajn lingvo povas esti ligiloj al samtemaj artikoloj en aliaj lingvoj.

Vikipedio ne estas enciklopedio laŭ la tradicia senco de la vorto. Verki "enciklopedion" sonas kiel tasko de gravaj sciencistoj. Vikipedio ne estas tia enciklopedio! En Vikipedio oni povas trovi informojn pri ĉiu ajn temo. Estas tute alia nivelo de detaloj.

Vikipedio ne estas "stato" sed "procezo". Procezo de kunlaboro de diversnaciaj homoj. Ĉiu artikolo estas rezulto de tiu procezo de kunlaborado. Ĝuste Esperanto nepre bezonas tiajn projektojn.

Ankaŭ gravas tio ke oni povas kontribui per tre malgranda ago. Ne necesas verki artikolon pri komplika afero. Jam sufiĉas korekti gramatikan eraron, aldoni ligilon aŭ iun alian etan detalon.

Gravas kuraĝigi ĉiujn geesperantistojn verki artikolojn por Vikipedio en Esperanto. La kvalito kaj la kvanto de artikoloj en Esperanto estas tuj kontrolebla pruvo pri la uzebleco de nia internacia lingvo.

En nia E-Asocio, krom kursoj pri Esperanto ni povas ankaŭ instrui la interesitojn pri la uzado de Vikipedio, tiel por konsultado de la enciklopedio kiel por kunredaktado de artikoloj.

Kiel ekzemplo de la prezentado de la interretaj paĝoj de Vikipedio, jen ni prezentas sube la koncernan paĝon pri **HELECO**, la presorgano de nia Astura Esperanta Asocio.

Fcv Mia diskutpaĝo Miaj preferoj Mia atentaro Miaj kontribuoj Elsaluti

Artikolo Diskuto — Legi Kontrolendaj ŝanĝoj Redakti Vidi historion — Serĉi

VIKIPEDIO
La libera enciklopedio

Ĉefpaĝo
Komunuma portalo
Diskutejo
Aktualaĵoj
Lastaj ŝanĝoj
Novaj paĝoj
Hazarda paĝo
Helpo
Donaci

Printi/eksporti
Krei libron
Elŝuti kiel PDF
Presebla versio

Iloj

### Heleco

[kontroli kontrolendajn ŝanĝojn] [Kaŝi]

La plej lasta reviziita versio (listigi ĉiujn) estis aprobita je 22 Apr. 2012. 8 ŝanĝoj bezonas kontrolon.

HELECO estas la titolo de la revuo eldonita de Astura Esperanta Asocio, el Ĥiĥono, (Asturio, Hispanio).

Komence la titolo HELECO estis la nomo de eta bulteno eldonita de la Esperanto-grupo La Verda Kolombejo de El Entrego, Asturio, el la 1950-jaroj. Poste, plejparto el la membroj de tiu E-grupo translokiĝis al Ĥiĥono pro laboraj kialoj, kaj de tiam ili fariĝis membroj de la tiuurba E-rondo Astura Esperanta Asocio. Kiam, en la jaro 1976, oni entreprenis en tiu E-asocio la eldonadon de revueto, iu el tiuj antikvaj membroj de La Verda Kolombejo sugesis la rehavon de la titolo HELECO.


Dum kelkaj jaroj la revuo aperis sufiĉe regule; estis eldonitaj kelkaj numeroj en la jaro. Tamen la enhavo estis ne tre riĉa; estis malmultaj paĝoj en ĉiu numero, kaj la kvalito de la presado estis malalta: oni ellaboris la bultenon per skribmaŝino kaj fotokopiado. Poste, iom-post-iom la kvalito de la presaĵo pliboniĝis, kaj pligrandiĝis la paĝo-nombro. Sed la apero de la revuo fariĝis ne tre regula kaj malpli ofta.

La artikoloj de la revuo montriĝis en duoblaj kolonoj kaj por Esperanto kaj por la hispana, sed el 2006 nur en Esperanto.

Lasttempe ĝi eldoniĝas, ĝenerale, po unu numeron jare. Ĝi prezentas artikolojn pri Esperanto, sed ankaŭ pri la loka agado kaj ĉiu ajn temo. Ofte, ĉiu numero de la revuo estas dediĉata al iu konkreta temo, kaj tiukaze, plejparto el la ĉapitroj aŭ artikoloj rilatas al tiu ĉeftemo. Ekzemple, la numero 80a de la revuo, eldonita en oktobro de la jaro 2005, estis speciale dediĉita al la temo de Don-Kiĥoto, tial ke tiu jaro estis la kvara Centjaro de la unua eldono de la verko de Cervanto. La sekvinta numero, eldonita ĝuste post unu jaro, estis dediĉita al Kristoforo Kolombo, la malkovrinto de la Amerika kontinento, ĉar tiujare estis la kvin-Centjaro de la morto de la fama maristo. Same, la 83a numero de HELECO, eldonita en septembro de 2008, estis dediĉita al la milito de nia lando kontraŭ la invado de la Napoleona armeo ĉar tiam estis la du-Centjaro de tiu invado. En la jaro 2009, iu speciala, cent-paĝa numero de la revuo festis la Centjaron de la fondiĝo de Astura Esperanta Asocio. Kaj la 86a numero de la revuo, eldonita en junio de la jaro 2011 havas kiel ĉeftemo la ekonomian krizon, kiu nun frapas nian socion.

Krom la presado de malmultaj ekzempleroj, la revuo disvastiĝas al la publiko ĉefe per Interreto, t.e. ĝi aperas ene de la ret-paĝo de Astura Esperanta Asocio, kies ret-adreso estas: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/ konkrete en la sub-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/heleco.html

En tiu retejo estas numeroj ekde la jaro 1999.



Frontpaĝo de la 80a numero de HELECO